
Li estas parto de la mondo. Se okazas milito en Vjetnamio, li kie ajn estas minacata. Se estas malsato en Pakistano, li malsatas. Liaj kunhomoj estas lia protekto. Kontraŭ ili li ne devas protekti sin.

Do, kiel ono kreas mondon sen limoj?

■ Estu ĉiam suspekta pri barikadoj kaj bariloj kaj bariloj, doganaj muroj, postuloj por esti akceptata eniri lernejojn, pri gildaj regularoj, "ĉapoj" (insignoj) de prestiĝaj institutoj/lernejoj, militstaj ordenoj, rotariaj butonoj. Rifuzu eniri grupon, kiu postulas ke vi izoliĝu.

■ Rilatu al laueble multspecaj homoj. Konstatu kiel ili vivas, kiujn revojn ili revas, kiujn problemojn ili havas kaj kiel ili solas tiujn. Vi trovos, ke – inter vi – estas pli multe kio kunigas ol disigas.

■ Ne uzu simplecon se vi volas multifacetecon. Turnu vin al diversaj grupoj, ne nur al samideanoj/kolegoj. Bone akceptu "dizertulojn".

■ Kontraŭbatalu provincialismon en via propra animo. Legu kaj vojaĝu. Disvastigu viajn limojn. Konatiĝu kun alispecaj vivmanieroj, kun aliaj moroj kaj kulturoj. Lerne Esperanton, la mondan lingvon, malpermesitan de Stalin kaj Hitler, de diktatoroj en Ĉino kaj Portugalio. Malkaŝu ĉiun ĉiun provon kalumnii la lingvon. Laboru por enkonduki Esperanton kiel unuan fremdlingvon en la lernejon.

Kiu volas esti senlima, devas mem posedi senliman lingvon.

Kunlaboro kun Svedo

Poŝta Administracio

Poŝto de Svedio eldnos helpilon pri Korespondado por svedoj, kiuj lernis aŭ deziras lerni esperanton kaj eluzi ĝin por korespondado. Aŭtorinoj estas Åsa Sahlquist kaj Inga Johanson, ambaŭ gotenburganoj.

Vi povas jam nun mendi la libron ĉe Poŝta Revuo "Skriv & Berätta", poŝta ĝirkonto n:ro 185-9, Stockholmo. Prezo: 14 Skr.

Ne miru, kiam vi ekvidos la ti-



tolon de la libro: Kor^respondu Esperante. Kial tiuj du "r^r"? Nu, la verkintoj faris vortludon! Vi certe komprenas ke temas pri "korespondu", sed temas ankaŭ pri "Kor-respondu". Gravege estas, ke vi kaj ĉiuj aliaj esperantistoj respondu kore, ĉu ne?

Kvankam ankoraŭ ne atingis min preta ekzemplero de la libro, kiam mi skribas tion, mi tamen tre kore rekomendas al vi jam nun mendi ĝin. Povas esti, ke vi iom post iom povos ankaŭ pridemandi la libron en via propra poŝtoficejo. Supozeble je!

Lennart Åberg

EKSPozICIO EN GOTENBURGO

En Gotenburgo la esperantistoj ofte prezentas ekspoziciojn. En Urba Informa Centro Lennart Åberg ĉiujare, 3–5 foje, aranĝas ekspoziciojn por konigi al la multnombra publiko Esperanton. Pli ol dumil homojn ĉiutage vizitas tiun domon, kiu havas turisman kaj komunuman informojn, bilevendejon por teatroj, sportaj eventoj ktp. Surbilde vi trovas serion da afiŝoj, kiujn eldonis UN-Asocio de Svedio. Lennart Å kompletigis ĉiun bildon per konvena teksto pri Esperanto. Krome estis prezentataj sur grandformataj kolorbildoj UK-urboj proksimaj. Aŭgsburgo kaj Pekino; surtable informaj presaĵoj pri Esperanto, granda kolekto de esperanta literaturo ktp. Krome, tre informaj tekstoj kaj bildoj pri Paco, pri Turismo, pri kunlaboro kun UN ktp estis troveblaj en la

ekspozicia fako de la Informejo. Deĵoris en la ekspoziciejo Lennart Åberg mem du semajnojn en septembro kun bona helpo de Maria Langhé kaj Andreas Nordström. Finiĝas nun tiuj aranĝoj de Lennart Åberg, kiu – pro aĝo – deziras transdoni tiun taskon al pli junaj fortoj.

Tedu regiono

Den 17-18/11 ska vi ha vår nu traditionella regionträff, som vi brukar ha varje termin. Eftersom vi alla blev så förtjusta i den underbara miljön i MEDEVI BRUNN (vid Motala) hoppas vi kunna vara där igen. Vi ska ha nybörjarkurs enligt suggestopedi-modellen ledd av Bertil Wennergren, konversationskurs, som Anna Alamo Sandgren ska leda. Ett seminarium om konst och litteratur kommer att ledas av Tamara Roszak från Polen, som är professionell konstnär och förhoppningsvis Zora Heide, Stockholm, som är professionell författare. Klas Persson från Västerås kommer att leda en kurs i argumentationsteknik. (fortsättningen på SEF:s "pilotkurs" i det ämnet.

Om någon från någon annan region tycker att det här låter spännande får ni gärna komma med.

Eftersom kurserna kommer att äga rum just under pressläggningen av La Espero, kan jag inte rapportera om resultatet.

Den 29 september träffades regionens studiecirkledare till en träff i Norrköping, för att diskutera med varandra hur man kan lägga upp en kurs så att den blir bra. 14 studieledare från olika håll i regionen deltog och diskussionen var livlig och förslagen många och intressanta. Man kan läsa om dem i TEDU-bladet. Under hösten sätter det igång kurser i stort sett överallt i regionen, men särskilt vill jag nämna ett par nya ställen. Vingåker där Gunilla Eriksson försöker få igång en kurs och i Kumla by skola i Kumla, där

en grupp läser esperanto i Fritt valt arbete.

TEDU-regionen är den som livligast har anmält sitt intresse för den rikliga turnéverksamheten, som SEF ordnar i vinter med fyra föreläsare från olika länder.

Kerstin Rohdin

Nordokcidenta regiono

Telefonis al Esperanto Centre Oskar Evaldsson, Enviken, Li kaj lia edzino Lillemor partoprenis en februaro en semajnfina kurso en Falun. Nun li mendis kurslibrojn al komenca kurso en Svärdsjö. Felica okazo, ĉu ne?, kiu donas esperon pri evoluo de la movado en la regiono.

Ankaŭ en la plej okcidenta parto de la regiono oni povas antaŭenti esperon. Ekzistas nur du vivantaj kluboj en Värmland sed tamen ne malmultaj rektaj membroj en diversaj lokoj. Ni komencis plani, kion fari por vigligi la movadon tie.

Ingemar Nordin

DAGS FÖR UEA

Nu är det dags igen att betala årsavgiften till UEA. Gör det i god tid, så hjälper du både dig själv och UEA.

Välj rätt avgift:

MA-medlem, dvs medlem med både årsbok och tidningen *Esperanto*, ett måste för alla aktiva esperantister **200:—**

MJ-medlem, dvs medlem med enbart UEAs årsbok **80:—**

SZ-medlem, dvs medlem i *Societo Zamenhof*. Denna avgift betalas utöver ovanstående avgifter. SZ-medlem blir stödjande medlem i UEA. Vi svenskar, som har möjlighet att betala till andra länder, och som har råd att betala, kan genom denna extra avgift göra en god insats för att hjälpa den internationella organisationen. **400:—**

INDIVIDUELL MEDLEM MA eller MJ t o m 25 år blir automatiskt medlem i ungdomssektionen **TEJO** och får utan kostnad *kontakto*. Sådan medlemmar ska anteckna MA-K eller MJ-K på inbetalningstalongen. Andra medlemmar kan prenumerera på *kontakto* för 60 kronor per år.

Inbetalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Förfrågningar kan göras hos Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09.

Nova renkontiĝo en Tjörnarp. Svedio

Tempo: 26/4 vespere – 1/5 vespere 1985.

Programo: Studvizitoj en sociaj "hejmoj", turismaj vizitoj, amika kunestado.

Kosto: Por partoprenontoj el okcidentaj landoj 750 svedaj kronoj inkluzivas tranoktadon en lignaj dometoj, manĝon kaj programon.

Adreso por aliĝi: Kerstin Rohdin, Ålsta, 690 72 SKÖLLERSTA Svedio Pagu samtempe al bankgiro 414-2261 Monda Turismo, Ann-Christine Krondahl, TOLLARP Svedio. (Indiku sekson por la loĝado)

La nombro estas limigita al 60 personoj. ALIGU TUJ!!

Kortspel som läromedel

Malte Markheden i Strömsnäsbruk har gjort en kortlek för esperantister, "Ludi kaj lerni". Kortspel med fyra eller flera deltagare utgör en trevlig och lättsam metod att lära sig ett antal ord och att öva konversation på esperanto. Mycket lämplig form som komplement till kurser, men är också ett trevligt medel i samvaron med erfarna esperantister. Pris 15 kronor per kortlek.



”Nur neŭtralistoj povas iri Pollanden ’87”

Legante la ”Opinio”-artikoleon: ”Ĉu ni volas iri Pollanden ’87?”, miaj okul-vitroj preskaŭ falis de mia nazo. Mi volonte (kaj iom ironie) volus meti la demandon: ”ĉu vere s-ro Dixi (ktp) Vilborg volas ke la esperantistaro festas la cent-jaran jubileon de nia lingvo en lando, Svislando!, kiu dum jarcentoj fi-maniere pli-riĉiĝis sin per vendado de aerovezikoj enhavantaj fromaĝoj al siaj najbarolandoj?”.

”Ĉiu povas ja kompreni ke per tiuj kaŝe en-fermitaj aerovezikoj la kvanto de la fromaĝoj nur ŝajne estas tiom, kiom ĝi aspektas?”.

Nu, ŝerco for.

La demando pri la neŭtraleco kaj la tiel nomata ”interna ideo” de Esperanto (E:o) meritas pli seriozan atenton.

Per ironio mi nur volis montri ke ĉiam oni povas trovi pardonojn porne iri ien aŭ tien.

La svisoj estu trankvilaj, mi alpo-alte ŝatas iliajn fromaĝojn kaj ankaŭ ilian laboron por nia lingvo. La sama ankaŭ validas por s-ro Vilborg kies merito por E:o estas vaste konata.

S-ro Vilborg prave montras ke la pola reĝimo certe kaj volonte faros ĉion eblan por propagandisian propran glorian.

Ni ĉin nur ne forgesu ke ankaŭ ni havas ilojn por kontraŭ-agi kaj ekzemple montri nian solidarecon kun ”Solidarnosc”. Ja estas eble, ankaŭ por sinjoro Vilborg, kaj ni ceteraj, por iel transdoni niajn sindikatajn salutojn, krei kontaktojn kun poloj antaŭ la kongreso, utiligi tiujn kontaktojn (individuajn aŭ kolektivajn) dum la

UK kaj poste skribi artikolojn en niaj gazetoj pri niaj spertoj.

Ni ĉin ricevis fantazion por uzi ĝin kaj trovi vojojn por kontraŭ-agi al la reĝim-propagandaj artifikoj kiujn ni verŝajne renkontos.

Ne nur la E:o-movado riskos esti uzata por iu aŭ tiu celo, ankaŭ la eventualaj flankaj celoj de la reĝimo riskos esti malkovrataj de la eksterlanda esperantistaro, ĉu ne?

Pli grave tamen, mi pri-juĝas ke s-ro Vilborg ĉi tie esprimas malnovan, ne nun-tempan kaj certe ne-neŭtralan (tial mal-taŭgan) interpretadon de la esperantismo.

Krom tio: esperantistoj kiuj vivas sub certaj reĝimoj jam havas sufiĉe da malfacilaĵoj, se ni ĉiam agas kiel ĉi tie s-ro Vilborg, tiam estas pli kaj pli malfacile por ili esti esperantistoj kaj senco-plene uzi E:on.

Pli konkrete, oni devas elektri: aŭ ni prezentas E:on kiel lingvo, kaj tial ion relative neŭtralan, aŭ ni prezentas la esperantisman internan ideon, kun la sufiĉe nebula idearo pri internacia frateco, tutmonda justeco ktp ktp. Kompreneble, la ”interna ideo” estis ege grava dum la unuaj jardekoj de la E:o-movado, kiam ankoraŭ ne ekzistis realaj profitoj por la esperantistoj. Tiam nur ekzistis idealismaj vizioj, kaj nenio povas bari ke ni persone ligas E:on kun tiuj plej alt-noblaj progresemaj ideoj.

Tamen, prezentante iun aŭ tiun interpretadon de la Zamenhofa ”interna ideo” nun, faras ke la esperantismo iĝas ne plu neŭtrala lingvo, sed ĝi estas konsiderata

Det här är vår insändarspalt. Har du funderingar som angår Esperanto så skriv till oss.

kiel duon-politika aŭ pseŭda filozofia movado, kaj tial ili (la esperantistoj) ne povas grand-kongresi en Pollando.

Estas evidente ke ankaŭ per tiu sintendo de s-ro Vilborg ni perdis multon kompare al la angla kaj aliaj lingvoj. Oni ja devas komuniki ankaŭ kun ekz. sudafrikanoj, komunistoj, mohametananoj, kapitalistoj, kristanoj, ktp. Tio nur estas ebla kiam E:o restas lingvo neŭtrala.

Tial, revenu el tiu sakstrato kaj ekceptu la nuran neŭtralan ideon ke E:o unue estas lingvo, estas ilo por komunikado.

La cetero estas latino por mi.

Chris B. Vos.



Ĝermo al sveda kabareto semita en Miedzygorze?

9 svedaj esperantistoj partoprenis la 20:an "Ora Pola Aŭtuno" en Miedzygorze, fama turistloko proksimel la polĉeĥa limo. La jubilea aranĝo allogis rekordan partoprenantaron, 450 tre varie esperantoparolantaj kaj aĝajn samideanojn el 11 landoj: Pollando (400), Svedio (la plej granda eksterlanda grupo), Italio, Anglio, Aŭstrio, Danlando, ambau Germanioj, Japanio, Nederlando kaj Islando.

Ĉiuj kiuj iam estis en Miedzygorze konas la amikan atmosferon tie. Ĝi regis denove same varme en gajaj vesperoj, ekskursoj per aŭtobusoj aŭ piede kaj kursoj.

Kerstin Rohdin el Örebro parolis por Svedio kaj dum la inaŭguro kaj dum la solena fermo. Ŝi ankaŭ reĝisoris la svedan parton de la Internacia vespero. Laŭ la gvidantino de la tiatipaj aranĝoj, Ursula Topeika, la sveda "kabareto" estis la pinto dum la Internacia vespero. Eble ĝermo al sveda esperantista kabareto estis semita tie? Estis kantoj, ŝercoj,

ironia superrigardo de la komuna polsveda historio kaj eĉ balondanco. Nu la lasta ne estis "la nuda vero", ĉar la tri dancantoj sub la balonoj portis etajn kalsonojn. (Ili cetere vekis gapan intereson en la publiko ĉar ili nuntempe estas tre malhaveblaj en Pollando...) En ĉifona balo imponis la elpensriĉeco – partoprenis eĉ siamaj ĝemeloj!

Unu pieda ekskurso estis al ĉeĥa limo en alteco de 1200 metroj. Montriĝis fakte ebleco dum minuto transiri la limon. Kortuŝaj estis tri esperantlingvaj diservoj kun petoj pri paco kaj plibonigotaj kondiĉoj en Pollando.

Ĉiuj lingvoniveloj havis eblecojn ekzerci sin dum kursoj. Precipe interesaj temoj estis traktitaj dum la esperantologia kurso fare de la eminenta preleganto Antoni Golonka.

Venontjare Ora Pola Aŭtuno estas planata dum la lasta duono de septembro.

Börje Andersson
Skövde



"Kelkaj partoprenantoj" en Ora Pola Aŭtuno. Fotis: Börje Andersson

Novaj poŝtmarkoj


La 28-an de aŭgusto – 7-a de septembro 1986 okazos internacia poŝtmarka ekspozicio – Stockholm 86 – aranĝota de Sveda Filatelista Asocio konekse kun la Poŝto.

Okaze de tio la poŝto ĵus eldonis kajeron kun kvar poŝtmarkoj en valoroj de 1, 2, 3 kaj 4 kronoj, kiuj prezentas kvar historiajn leterojn. La unua estas de Eriko XIV al la reĝino Elizabeth de Anglujo, en kiu li latine rakontas pri sia svatveturo, kiu rompiĝis pro fortaj aŭtunaj ventegoj sur Skagerako. La dua marko prezentas leteron de Eriko Dahlbergh al Sten Bielke kun petoj pri mono por fortikajkonstruado en Gotenburgo. La tria marko prezentas Plumleteron, tiel nomata pro la kutimo en la fino de la dekoka jarcento apliki plumojn en la vak-sosigelaĵojn ĉe urĝaj leteroj. La kvara marko prezentas leteron de Aŭgusto Strindberg al sia plu frua edzino la aktorino Harriet Bosse, en kiu Strindberg esprimas antaŭzorgon pri ilia komuna trijara filino.

Sur la kovrilo de la kolekto estas ankaŭ letero, skribita de la sesjara kronprinco Gustavo (III:a) al sia patro reĝo Adolfo Fredriko.

La poŝtmarkoj estas belaj kaj certe allogaj por kolektantoj.

RS



DANKON

Tre koran dankon pro Via malavareco al niaj diversaj kolektadoj:

DONACO

Henry Almar, Trollhättan
Markaryds PRO
Entute 300 kr

KLUBO 100 JAROJ

Gustav Nygård
Entute 100 kr

LÖNEINSAMLINGAR

Lennart Svensson, Ljungby
Dagmar o. William Malmsten, Göteborg
Entute 1.100 kr

KLUBO CENT

Örebro Esperantoförening
Harry Haglund, Västerås
Ruben Enocson, Solna
Karl Gustafsson, Bergvik
Ragnar Hjorth, Stockholm
Gunnar Larsson, Stockholm
Maja Ahlström, Västra Frölunda
Esperantogruppern Vitus, Karlskrona
Karl Gustafsson, Bergvik
Entute 1.650 kr

TILL MINNE AV KARL GUSTAFSSON

Erik Svärd, Malmö
Betta Hedlund, Söderala
Signe Lindberg, Åke o. Svea Andersson, Per-Anders o.
Elisabeth Andersson, Gävle
Ruth Pettersson, Söderhamn
Anita Lindblom, Stockholm
Kerstin o. Lars P. Sköld, Söderhamn
Dorothy Larsson, Lilly o. Albin Larsson, Bergvik
Runo, Esbjörn o. Kaj Stridell, Stockholm
Werner Orre, Ljusne
Lilian Kullenberg, Alfta
Valborg o. Gustaf Svärd, Söderhamn
Marthe o. Per Hedlund, Söderhamn
Helga o. John Karlsson, Söderhamn
Margit o. Kerstin (Kullander), Sandarne
Esperantoföreningen i Gävle
Anna Maria Eriksson, Söderhamn
Åke Näsholm, Sundsvall
Familjerna Henrik Lohman o. Lennart Alvemyr
Svea o. Einar Danielsson, Bergvik
Entute 2.065:–

Deziras korespondi:

LOVA'SZ MARIANNE
Szeghalom
Kossuth te'r 7
5520
Magyarorsza'g
15-jara hungara lernantino.

Ľubomir Macek
1. maja 1945/53
Liptovský Mikuláš
CS 03103

10-jara lernanto. Intereso: mate-
matiko kaj geografio

TERESA JAGIELA
Pl 96-100 Skierniewice
ul, Mszczonowska 25 m. 42
Pollando

23-jara fraŭlino. Intereso: sporto,
turismo, muziko, literaturo.

JOLA KRUK
ul, Nowodworska 25/16
85-120 Bydgoszcz
Pollando

23-jara studentino. Intereso:
fremdaj lingvoj, interesaj libroj,
vojaĝo.

WOJCIECH GROCHOWSKI
01-184 Warszawa
ul. Wawelberga 3 m 185
Pollando

26-jara. Intereso: sporto, turismo,
muziko ktp

PETÂR MATEEV
Str. Bratza Mjladjnovj 68, Vh. G
9000 Varna

Bulgario
deziras krespondi. Li estas 25 j
studento pri medicino. Intereso:
pskilologio, literaturo, lingvoj.
Marcella kaj Suzanne Kovacs, Ba-
konszeg, Deak Fu2, H-4164
Hungario – mezaĝaj instruistinoj
pri literaturo, historio, ĉiutagaj
aĵoj.

Telekesi Judit, MISKOLC, Paloc-
zyut 1, 3525 Hungario – 17-jara
knabino.

Safhundoj lernas la svedan

Antaŭ kelkaj monatoj 12 aŭstraliaj hundoj lernis obei al ordonoj en la sveda lingvo por povi arigi boacojn. Ili ĵus vojaĝis al Laponio post antaŭa sukcesa demonstro al boacopaŝtistoj, kiam 3 tiaj hundoj lerte manipulis 20 000 boacojn.

La hundoj estas »kelpioj». Tio estas speciala aŭstralia hundoraso, bredata por arigi kaj peli dekmilojn de merinosoj kaj aliaj ŝafoj sur la imensaj paŝtejoj de la duondezertaj stepoj de Aŭstralio. La kelpioj kutime venkas en la konkursoj inter ŝafhundoj dum la grandiozaj kamparfoiroj.

La eksportinto, Tim Austin, kiu akompanis la hundojn al Laponio, starigis sian elitajn kelpibredejojn en Coleraine, Viktorio, en 1956. La bredejo »Elfindale» ĉiujare produktas kaj dresas 200 ĝis 300 hundojn, el kiuj 10 % estas eksportataj al Kanado, Svedio, Japanio, Afriko, Nov-Zelando kaj Usono. La kosto de ĵuna hundino povus esti nur 250 dolaroj, sed plene plene dresita hundo povus atingi 1 500 dolarojn.

La teamo por Laponio estas elektita el 150 hundoj kaj dresita far Jens Ambjerg Pedersen. S-ro Pedersen estis antaŭe sukcesa porkobredisto en Danlando. Poste li migris al Sud-Aŭstralio, kie li bredis ŝafojn por lano kaj ŝafidojn por viando. Ekde kelkaj jaroj li helpas pri dresado de la kelpioj de Elfindale. Li diras, ke

Esperanto en Radio

Stacio	Tempo laŭ UT *)	Frekvencoj je kHz (ondlongoj je metroj)
Ĉiutage:		
Varsovio	0530-0600	1503 (200), 5995 (50,0), 6135 (48,9) 7270 (41,3)
	1100-1125	7145 (42,0), 9525 (31,5)
	1530-1555	7285 (41,2), 9675 (31,0)
	1630-1655	6095 (49,2), 7285 (41,2)
	1930-2000	6095 (49,2), 7285 (41,2)
	2130-2155	1503 (200), 5995 (50,0), 7285 (41,2)
Pekino	2000-2030	9365 (32,0), 9965 (30,1), 15110 (19,8)
	2230-2300	9860 (30,4), 11515 (26,1)
Lunde:		
Berno	1800-1810	3985 (75,3), 6165 (48,7), 9533 (31,5)
	2030-2040	3985 (75,3), 6165 (48,7), 9535 (31,5)
Marde:		
Zagrebo	2245-2300	1143 (262,4)
Ĵaŭde:		
Vatikano	0600-0615	6250 (48,0), 9625 (31,2), 11715 (25,6)
Berno	1800-1810	kiel lunde
	2030-2040	kiel lunde
Sabate:		
Berno	1800-1810	kiel lunde
Romo	2000-2020	7275 (41,2), 7290 (41,1), 9575 (31,3)
Berno	2030-2300	kiel lunde
Dimanĉe:		
Vieno	0645-0557	5945 (50,5), 6155 (48,7), 17745 (16,9)
	0945-0957	6155 (48,7), 7170 (41,8), 9770 (30,7)
Vatikano	2000-2010	6190 (48,5), 6250 (48,0), 7250 (41,4)

*) ATENTU! En la programo vi trovas tempan indikon laŭ UT (Universala Tempo, antaŭe GMT). Por Svedio validas MET (Mez-Eŭropa Tempo), kiel vi devas aldoni unu horon al UT; en periodo de somera tempo aldonu du horojn!

Aŭskultu kaj skribu al la Esperanto-Redakcio(j) ĉe Radio Polonia, Pk 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando; Radio Pekino, Beijing (Pekino), Ĉinio; Svisa Radio Internacia, CH-3000 BERN 15, Svislando; Radio Zagreb, Jurišĉeva 4, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; Aŭstria Radio - ORF, Pf 700, A-1041 WIEN, Aŭstrio.

tri hundoj, kies nomoj estas Puk, Eigeland kaj Fie, bone komprenas la danan kaj la svedan.

Post la alveno de la »boacohundoj» s-roj Austin kaj Pedersen vojaĝos en aliaj partoj de Skandinavio por diskonigi la meritojn de la kelpia raso.



RLH

(El MONATO n-ro 11/1983)

Birdo Fenikso

de August Strindberg



I

En la fragotempo, en la pastra bieno, li vidis ŝin unufoje. Li vidis multajn junulinojn antaŭe, sed kiam li vidis ŝin, tiam li sciis, ke estas ŝi. Sed li ne kuraĝis ion diri, kaj ŝi ridetis al li, ĉar li ankoraŭ estis nur gimnaziano. Sed li revinis kiel abituriento. Kaj tiam li ĉirkaŭprenis ŝian talion kaj kisis ŝin, kaj li vidis raketfaskojn, aŭdis srnoradon kaj ĉaskornon, kaj li sentis tertremon sub la botoj.

Ŝi estis dekkvarjara virino. Ŝiaj mamoj altenŝvelis kvazaŭ ili atendus avidajn buŝetojn kaj alkroĉantajn manetojn, ŝia iro estis firma per elastaj suroj kaj balanciĝantaj lumboj, kvazaŭ ŝi povus kiam ajn porti etulojn sub sia koro. Ŝia hararo estis flava kaj delikata kiel fandita mielo kaj ĉiam ĉirkaŭis ŝian frunton kvazaŭ akvoŝpruco. La okuloj ardis kaj la hauto estis freŝa kaj mola kiel gantledo. Ili estis gefianĉoj kaj kisis unu la alian kiel birdoj en la ĝardeno sub la tilio, en la arbaro, kaj la vivo etendiĝis kiel suna nefalĉita herbejo antaŭ ili. Sed unue li trapasu ekzamenon, miningenieran, kaj tio postulos kun eksterlanda vojaĝo dek jaroj! Dek jarojn!

Kaj li veturis al Upsala! En la somero li revenis al la pastra bieno, kaj ŝi estis same bela. Tri fojojn li revinis, sed la kvaran fojon ŝi estis pala. Ŝi havis ruĝajn streketojn en la nazanguloj kaj la mamoj jam malaltiĝis. Kiam la sesa somero venis, ŝi prenis feron kaj la sepan ŝi vojaĝis al banloko. La okan ŝi havis dentodoloron kaj estis nervoza. La okan ŝi havis dentodoloron kaj estis nervoza. La hararo perdis sian brilon, la

voĉo estis akra, la nazo havis nigrajn punktetojn, la mamoj estis for, la iro estis treiniĝa kaj la vangoj kavaj. En la vintro ŝi havis nervan febron, kaj devis fortondi la hararon. Kiam ĝi ree kreskis ĝi estis cindrokolora. Li enamiĝis je blonda dekkvarjara junulino, li neniam povis rigardi brunulinon, kaj li edzinigis cindroharan dekkvarjaran virinon, kiu ne volis esti dekolita je la edziniĝo.

Sed tamen li amis ŝin. Lia amo ne estis tiel furioza kiel antaŭe, sed firma kaj trankvila, kaj en la malgranda monturbo nenio ĝenis ilian trankvilan feliĉon. Ŝi naskis du knabetojn sinsekve, sed la edzo tre deziris knabinon. Kaj vnis ankaŭ knabino, blonda knabine-to.

Kaj ŝi estis la pupilo de la patro. Ŝi kreskis kaj similis al sia patrino, tia kia ŝi iam estis. Kaj la patro neniam okupiĝis pri io alia ol sia filino, kiam li havis libertempon. La patrino mastrumadis kaj havis krudajn manojn. La nazo estis komedona kaj tempioj estis kavigitaj. Ŝia staturo kurbiĝis iomete pro la ofta klinado super la kuirforno. Kaj la patro kaj patrino nur renkontiĝis ĉe la manĝotablo kaj dumnokte. Ili neniam kvarelis, sed tamen, ne estis kiel antaŭe.

Sed la filino, ŝi estis la feliĉo de la patro. Oni preskaŭ povus diri ke li enamiĝis al ŝi. Estis kvazaŭ li en ŝi vidis la reviviĝintan patrinon, kaj kvazaŭ lia unua vidaĵo, kiu tiel rapide forpasis, reaperus. Li estis preskaŭ iomete hontema antaŭ ŝi, kaj neniam eniris kiam ŝi vestis sin. Li adoris ŝin.

Unu matenon ŝi restis kuŝanta en la lito kaj ne volis leviĝi. Panjo kredis ke ŝi afektas malsanon por

foresti de la lernejo, seda paĉjo vokis la kuraciston. La mortanĝelo vizitis ilin; estis difterio. Unu el la gepatroj devis fuĝi kun la alia infanoj. la patro ne volis fuĝi. La patrino devis fuĝi aliloken en la urbo kun la aliaj infanoj kaj la patro restis ĉe la malsanulino. Kaj tie ŝi nun kuŝis! Oni sulfurumis tiel ke ĉiuj orumitaj pentrajkadroj nigriĝis kaj la arĝentaĵoj de la tualetejo ankaŭ! La patro preskaŭ perdis la sinregon irante en la senhomaj ĉambroj, kaj kiam li dumnokte kuŝis sola en la granda lito, li sentis sin kvazaŭ vidvo. Li aĉetis ludilojn por la etulino kaj ŝi ridetis, kiam li ludis pulĉinelon sur la litrando, kaj ŝi demandis pri panjo kaj la gefratoj.

Kaj la patro devis eliri surstraten por kapsaluti al la patrino kaj ĵeti fingrokisojn al la infanoj. Kaj la patrino telegrafis per blujaj kaj ruĝaj paperfolioj tra la fenestroj.

Sed unu tagon la etulino ne plu volis vidu pulĉinelon, kaj ŝi ne plu ridetis. Ŝi ane plu povis paroli. La morton venis, venis kun siaj longaj brakoj kaj sufokis ŝin. Sed estis akra batalo.

Tiam la patrino venis! Ŝi havis konsciencajn riproĉojn, ke ŝi forlasis sian infanon. Kaj estis multa lamentado kaj granda mizero.

Kaj kiam la kuracisto volis veni por nekropsii la etulinon, la patro ne volis konsenti. Ili ne vundu ŝin per siaj tranĉiloj, ĉar por li ŝi ne provas esti morta. Sed tio devis kazi. Kaj tiam li volis bati la kuraciston kaj mordi lin.

Sed kiam ŝi estis entombigita, li konstruis tomban monumenton, kaj iris tien ĉiutage la tutan jaron. Dum la dua jaro malpli ofte. La laboro estis peniga kaj la tempo nesfika. La jaroj komencis pezi, la

paŝoj iĝis pli pezaj kaj la funebro forkreskis. Kelkfoje li hontis ke li ne tre profunde funebras, sed baldaŭ li forgesis tion. Li rivevis ankoraŭ du filinojn, sed tio ne estis same kiel antaŭe; si, kiu mortis, neniam estos anstataŭigebla.

La vivo estis severa, la orumo nerimakreble estis forfalita de la juni virino, kiu iam estis tia — kia neniŭ alia virino en la mondo. La orumo estis forfalinta de la hejmo, kiu iam estis tiel brila. La infanoj jam faris tuberojn kaj kave-tojn en la argentaj geedziĝaj donacoj de la dommastrino; ili gratis la litten kaj piedbatis la seĝopiedojn. La rembujo, enligis el la sofo, kaj la piano ne estis malfermita deŝto longaj jaroj. La kantado cedis al infankrioj, kaj la voĉoj rakigiĝis. La tenerajn vortojn oni formetis kiel la infanvestojn, la karesoj fariĝis masaĝo. Oni komencis maljungi kaj laciĝi. Paĉjo ne plu surgenuiĝis antaŭ panjo, sed li sidis en sia eluzita apogseĝo kaj igis panjon alporti la alumentojn, kiam li volis ekbruligi sian pipon. Oni estis maljuna!

Panjo mortis kiam paĉjo estis kvindekjara. Sed nun ĉio reaperis, ĉiuj pasintaĵoj. Kiam ŝia kaduka korpo, malbeligita de la luktado kun mortom, estis enterigata, tiam li rememoris la dekkvarjaran junulinon. Tiam li funebris ŝin, kiun li perdis antaŭ longe, kaj kun la perdosento venis la pentado. Sed il ja neniam estis malica al panjo, kaj ŝi, la dekkvarjara en la pastra bieno, kiun li neniam akiris, ĉar li akiris nur la palan dudekkvarjaran, antaŭ ŝi li ja surgenuiĝis, estis fidela kaj adoranta. Kaj fakte estis ŝi, kiun li plej multe funebris. La bongusta manĝaĵo de panjo kaj ŝia neniam laciĝanta prizorgado ankaŭ ricevis parton de la perdosento, sed alimaniere.

Post tio li pli itimiĝis kun la infanoj. Kelkaj jam forflugis, sed kelkaj ankoraŭ restis hejme. Post unu jaro, dum kiu tempo li laciĝis siajn amikojn per biografioj pri sia mortiĝinta edzino, okazis io rimarkinda. Li ekvidis blondan, dekkvarjaran junulinon, kiu ekzakte similis al lia edzino, kiam ŝi estis

KALENDARO 1985

28a Internacia seminario. Tema: Japanio.	27	decembro
	1984—	
Wetzlar, FR Germanio	3	januaro 1985
Internacia junulara festivalo.	3—8	aprilo
Torino, Italujo		
Seminario pri Bulgario.		aprilo
En sveda regiono TEDU		
Renkontiĝo en Tjörnarp, Skanio (aliĝo al K. Rohdin)	27	aprilo—1 majo
SEF Jarkongreso. Helsingborg	16—19	majo
37 a Kongreso de internacia fervojista esperantista-federacio. Vejle, Danlando	17—23	majo
Printempa renkontiĝo en Mëlno, Pollando		majo
41 a Internacia junulara kongreso.		
Eringerfeld, FR Germanio	22—29	julio
53a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj. Augsburg, FR Germanio	27	julio—2 aŭgusto
70a Universala kongreso de esperanto.		
Augsburg, FR Germanio	3—10	augusto
Ora pola aŭtuno (aliĝo al K. Rohdin)		septembro
Vojaĝo el sveda regiono TEDU al Bulgario		oktobro
Internacia esperanto kursejo. Bulgario		ĉiu monate

DAGS ATT BLI UEA-DELEGAT (eller fack-delegat, vicedelegat) PÅ DIN ORT

Du vill säkert medverka till att göra UEA:s delegat-system ännu effektivare. Flera orter saknar delegat, vicedelegat eller fackdelegat. Tag gärna del av bestämmelserna i UEA:s årsbok eller gör förfrågan hos s-ino Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040-91 63 09. Där kan Du få blanketter, som sedan skall sändas tillbaka till samma adress. Anmäl gärna en vicedelegat på orten och intressera någon esperantist i Din förening att bli fackdelegat i något ämne. Avgiften för direkt medlemskap i UEA publiceras i La Espero.

Gör slag i saken.

dekkvarjara. Ci tion li komprenis kiel signon de la donacema ĉielo, kiu do fine volis doni al li ŝin, ŝin la unuan. Li ekamis ŝin, ĉar ŝi similis al la unua. Kaj ree li edziĝis. Nun li akiris ŝin. Sed la infanoj, precipe la knabinoj, montris antipation al la juna duon-

patrino, ili hontis vidi ŝin, ili opinis, ke io malĉasta troviĝas en tio ke la patro estas malfidela al ilia patrino. Kaj do ili forlasis la hejmon kaj iris en la mondon!

daŭrigota....

Esperanto i Lyrikvännen

Poesitidningen *Lyrikvännen* har i sitt första nummer för 1984 publicerat dikten *mamuta Ĉaso* på esperanto med svensk översättning parallellt. Dikten är skriven av *Leif Gunnar Nordenstorm* och tilldelades andra pris vid *Belartaj kursursoj 1983*.

Mamuta Ĉaso

Fore en valo mamuta greg'.
Monto da karno, giganta eg'.
Bestoj harajaj, grandega dent'.
Fosto svingata, enigma gent'.
Knabo vaganta en nura nud'.
Ŝnuro kaptila, porknaba lud'.
Krako nefora, brunhara best'.
Kur' vilaĝena sen ia rest'.
Knabo balbuta pro forta spir'.
Ĉefo fervora pro knaba dir'.
Viroj kontentaj, baldaŭa ĉas'.
Freŝa viando kaj nutra gras'.
Noktaj vizioj, ĉasista danc'.
Torĉoj flamantaj kaj svelta lanc'.
Olda ŝamano kun alka korn'.
Rita ekstaz' en aŭtuna morn'.
Svaga nebulo kaj longa ir'.
Frido blovanta, silenta vir'.
Herboj verdblankaj pro friska frost'.
Kavo fosita kun akra fost'.
Dorsoj harajaj kaj dors' da ŝton'.
Ronka spirado kaj paŝa son'.
Fajroj flamantaj sur eta mont'.
Bestoj dormantaj ĉe l' monta front'.

Ŝtonoj rulantaj, subita pum'.
Veko abrupta en torĉa lum'.
Miro terura kaj tuja fuĝ.
Montoj kurantaj, surdiga muĝ.
Ar' ekzaltita sen ajna brid'.
Bleko korŝira de eta id'.
Besta rivero, muĝanta flu'.
Kri'de sufero de best' en tru'.
Viv' baraktanta en tera kav'.
Kapto mortiga, nenia sav'.
Fosto trapika, obtuza ĝem'.
Lancoj flugantaj kaj fina trem'.
Viroj kiantaj sub ronda lun'.
Bela ĉasaĵa, molkarna jun'.
Ŝtona tranĉilo, baldaŭa mort'.
Fina perejo, ĉasaĵa sort'.
Tuja distranĉo kaj ruĝa sang'.
Mola viando kaj granda lang'.
Peza portaĵo al hema nest'.
Ĝua morgaŭa festena fest'.

Mamutjakten

Fjärran i dalen en mammuthjord.
Högar av kött, ja en väldig hord.
Håriga bestar, en krokig tand.
Svängande näsa, ett gåtfullt land.
Gossen helt naken, av sjukdom vek.
Snaran och slungan en nyttig lek.
Plötsligt ett knak och ett ludet djur.
Hemåt mot byn mellan gran och fur.
Gossen helt anfådd, av alla spord.
Hövdingen hänförd av gossens ord.
Männen så nöjda, i morgon jakt.
Högar av kött, ja en ymnig slakt.

Nattliga skuggor och jaktens dans.
Flammande facklor, en praktfull lans.
Trollkarlen gammal med älgens horn.
Hösten så dyster, ett glädjekorn.
Sveptande dimma i fjärran del.
Blåsande kyla och marken kal.
Vandringen tyst utan något rop.
Pålen så spetsig i utgrävd grop.
Håriga ryggar på stenig mark.
Tassande fotsteg och djurens snark.
Flammande facklor vid kullens fot.
Sovande djur framför bergets rot.
Rullande stenar, ett högljutt brus.
Väckta så plötsligt i facklors ljus.
Undran, förvåning och ändlös skräck.
Flyende berg genom dal och bäck.
Springande berg över fallna träd.
Smärtornas skrik från en unge späd.
Mullrande fötter, en ändlös flod.
Nere i gropen en ström av blod.
Kämpande lemmar i gropens djup.
Ungen helt hjälplös emellan stup.
Pålen så vass och ett sista vrål.
Flygande lansar och hjärtat mål.
Skrikande karlar i månen sken.
Köttet förträffligt och utan men.
Knivar av sten genom ungen död.
Kroppen nu slaktad och marken röd.
Tungan så stor och en börda tung.
Högar av kött från en unge ung.
Vägen till byn av en väldig längd.
Mat för en fest i ofantlig mängd.



*La estraro de SEF kaj la redakcio
de La Espero deziras
al ĉiuj legantoj
Bonan Kristnaskon
kaj
Feliĉan Novan Jaron*